GISTO, APR-2006.

Georgo Otto Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo.

NEA VORTO

Rimarkeblas ke kultaj lingvoj gxenerale metas la nean vorton antaù la ideo negate.Ekzemple: mi estas ne malsana char se mi estas, do mi ekzistas tamen, se mi diras mi NE estas, mi ne ekzistas. Tial oni difinos pli klare, se oni diras: mi estas NE malsana (mi ekzistas kaj estas NE malsana). Chu vi konsentas? Chefe kun la verbo DEVI oni observu la enhavon de la frazo: Mi ne devas flugi aù, mi devas NE flugi. Se oni diras, mi ne devas flugi, oni subkomprenas ke iu, ekz. kuracisto, rekomendas ke mi NE flugu (pro sanproblemo). Do, pli gxuste diri: Mi devas NE...Mi devas NE fari...devas NE paroli char, se mi diras, mi ne devas paroli, la motivo estas, ke io/iu malpermesas/is/os. La samo okazas kun aliaj verboj. La frazo estigxas pli klara, kun la nea vorto antaù la negata ideo. Tiel mi jam lernis en la unua grado kaj, germanlingve oni ankaù adoptas chi manieron uzi la negativon. Vi, kara leganto, bonvolu rezonadi pri la afero kaj poste lasu min ekscii vian opinion rilate al chi afero. G = ”Ich bin **NICHT** krank”

Aldone mi petas, ke vi opiniu pri la vortkunmetajxo BONVOLU... La geparolistoj de CHO-RO-I diras: bonvole aùskultu. Tiumaniere oni subkomprenas ke la aùskultantaro (aùskultanto) havu la bonvolemon aùskulti, Ekzemple. Tiu dirmaniero ne plene kongruas kun nia nacilingva kutimo: FAÇA O FAVOR DE!...

REAGO AL ANONCOJ

Mi parolas pri nacilingvaj anoncoj enhavantaj gravajn gramatikajn misojn. Per O,55 oni havas sxancon alskribi la respondeculo(j)n dirante ke oni bedaùras, ke okazis tia memtrompo pro forgeso de eroj lernintaj en la lernejo, ke eblaj klientoj miskomprenos aù subtaksos la entreprenon...ke al homo kiu scias Esperanton, tio ne okazas, ktp. En milito validas chiu rimedo, por trafi la celon.

GEEDZAJ PLENDOJ.

Kvankam homoj oldigxas, modera seksapetito restas. Ofte legeblas ke grizulinoj plendas pro la fakto ke la edzo ne plu emas pasigi kun sxi dolchajn kunvivadojn kaj amori. Kulpas chefe la TV-programoj. Sur la ekrano oni vidas nur belulinojn tute ne imiteblajn de edzinoj pro la oldeco kaj perdo de la charmo, granda motivo por la maloftigxo de seksrilatoj kiuj, siaflanke, estigas en la ino suspektojn ke la dumviva kompano, chiam fidela, komencas farigxi inda je suspektoj, pri filio de li kreita ie apude. Sxangxigxoj en lia fiziologia sinteno ankaù aldonas ingrediencojn por iel pravigi sxin. Pro chi faktoj estas ege konsilinde, ke la geo tenu malkasxan interkomprenon, por antaùzorge preventi kaj flankensxovi jxaluzon. Oni legas ke grizuloj surprizas parencojn pro subita separo aù ech krimo, ne komprenebla de junaj homoj. Do...”ne oldigxu!”

SENTENCOJ

Far Poul Thorsten – El INOE-bulteno.

La subchiela nudismo
Limigu sin al tropikoj.
Chi nobla ekspresionismo
Super kaj sub umbilikoj
En malpli favora klimato
Ne multe favoras al gvato.

Ne ekzistas kostumoj decaj,
Nur homoj tiaj kaj alispecaj.

Inter la stato vestita kaj nuda
Eblas kompromisi:
Kovri la korpon per farbo tuta
Kaj poste per kisoj striptizi.

Vualo vizagxa estas obskuro
Simila al la Berlina muro.

Neniu kisas lipojn,
Nur char chi tiuj nudas.
Portante vest-ekipojn,
Chu ajnaj tial prudas?

Butika ekspono de karno
Neniel alvokas indignon.
Do kial nudula charmo
"morale" vekas malignon?

Admiri nudecon libide
Ne eblas nur pretervide

Iom post iom la ban-bikinoj
Tiom mikroskopas
Ke G-strioj de nenudistaj modulinoj
Forestas por kiuj miopas.

Absurda repliko
Al naturisma amiko:
"Por chivespere festi
mi tute nenion havas por vesti!"
Almenaù du agoj kondichas
Foreston de kostumo:
Unu dum ni naskigxas,
Alia dum la seksumo.

Laù kaj la Biblio kaj PIVO
La lumbo kaùzas paradoksojn.
En lumbo la forto, plezuro kaj l'vivo,
Sed nepras unue karesi la koksojn.

Jen, mi verkas, verkadas pene,
Kaj tamen lamas la vendo.
Chu eble gxi kreskus, se mi sengxene
Ilustus per gapa pudendo?

KRUELEGAJXO

Eble chiuj legantoj TV-spektis la senkompatan "murdon" de senkulpaj fokidoj = foko-beboj, norde de Kanada' far senskrupulaj cxasistoj, per la plej kruela maniero, t.e. per sxtipo (por ne difekti la felon). Sango sxprucas el naztruoj kaj busxo kaj rugxe makulas la negxan areon, dum la fokopatrino, ne kapabla haltigi la batadon, gxeme plendas kaj plorema postsekvas la mortan idon dum oni trenas gxin al la veturilo kiu kolektas la milarojn da voktimoj. Chu tio ne afliktas nin, chi tie en la sudo de la mondo? – Nur ne al senkoraj homoj.- BV aligxi al la kampanjo kontraù tiu krimado. Kaiurbe pluraj lernejoj engagxigxas per eta letero kontraù la kanada permeso ke tiu chaso okazu norde de tiu lando.Vi ja estas inteligentaj gesamideanoj kaj ne bezonas mian chapelon sed, se vi tute ne scias kion diri, petu kopiajxon de letero de mi ensendita. Jen la adreso: EMBAIXADA DO CANADÁ NO BRASIL – SES 803 Lote n°.16 At.E SUL – 70410-900. – Per tia bonago vi havigas al vi pacon kaj krediton en la chielo!

HUMORO

ETA RUZULO

Jam laca pro tro ofta maltrafo de sxuldanto, la ricevisto diris al la knabeto kiu akceptis lin: Mi donos al vi 50 realojn, se vi diros al mi, kie mi povos trovi vian pachjon.

- Ne eble – respondis la knabo – Se mi diros, la tanado kiun mi suferos de pachjo valoras minimume cent realojn.